Александр Сергеевич Пушкин,

La vintra veturo

tradukita de Сергей Григорьевич Рублёв

En nebulo sur ĉielo
Vagas luno kun sopir',
Plensopire en malhelo
Lumas ĝi en sia ir'.

Sur la neĝo longa vojo
Sledo iras en rapid',
Sonorilo tre malĝoja
Monotonas kun incit'.

Kondukist' en longa kanto
Kantas multe kun fervor',
Jen pri ĝojo aroganta,
Jen suferon de la kor'.

Mankas fajro en vilaĝo ...
Sola neĝo ... En vetur'
Unutonas la pejzaĝo
De la vojmontriloj nur.

Tedas tute. Morgaŭ, Nino,
Jam finiĝos mia voj'.
Ĉe kameno, karulino,
Ni forgesos pri malĝoj'.

Sur horloĝo la montrilo
Venos plene ĝis la fin',
Noktomezo kun ĝentilo
Ne disigos certe nin.

Mi sopiras kaj enuas,
Kondukist' silentas nun;
Sonorilo tinte bruas,
Plennebulas pala lun'.

Traduko de la Rusa poemo "Зимняя дорога" de Александр Сергеевич Пушкин *(∗1799-06-06 – †1837-02-10) en Esperanton de* Сергей Григорьевич Рублёв *(Sergej Rublov, ∗1901 – †1979).*

Arg-1123-2272 (2015-02-02 13:32:54)

Pri la tradukinto vidu la retejon `http://ru.odeso.retejo.info/famaj-e-istoj/rubleev` *kaj* `http://en.odeso.retejo.info/famaj-e-istoj`.